LSG FORUMO n-ro 134 (4/2006)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj



## Raportoj de UK en Florenco p 2-3

Gejtema prelego en la Brazila Esperantokongreso p 4

Esti gejo en Barato/Hinda Unio p 5

Daŭras eksigoj el usona armeo pro gejeco p 5

Multo okazis en Kanado p 6

Pli pri la Festivalo de Fiero en Jerusalemo p 7





La ekonomia raporto 2
Beletra niĉo 8

## L. S. G.
## Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

**Retejo:** http://lsg-esperanto.org
**Adreso, retpoŝto:** Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.
**Membriĝo:** Kontaktu la sekr.-kasiston.
**Kotizo:** 10 EUR/1 jaro, 25 EUR/3 jaroj.

### ESTRARO

**Prezidanto:**
Arnold VICTOR, Apartment. 1, 160 West Eleventh Street, New York City, New York 10011, Usono;
arvimide(ĉe)earthlink.net
**Sekretario-kasisto:**
Rolf KÖHLER, Germanio;
lasekretario(ĉe)gmx.net /
lakasisto(ĉe)gmx.de
**Estrarano pri varbado:**
Francis, Francio;
fsoghomonian(ĉe)yahoo.fr
**Estrarano:**
Torstein, Norvegio;
kvakke(ĉe)hotmail.com
**Retprizorganto:**
Randy, Usono;
randy.dean(ĉe)pobox.com

### FORUMO – membrogazeto de LSG
### N-ro 134 (4/2006)

**Adreso, retpoŝto, provizora redaktanto:**
Andreas, Svedio;
...@....com

**Kontribuoj** al la gazeto ĉiam bonvenaj. La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.

**Ekspedo de FORUMO:** La sekretario-kasisto, vidu supre. Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto, se estas ĉeĥa adreso! La persono ne estas ligano. Ni nur forsendas la gazeton el Ĉeĥio pro la tieaj favoraj poŝttarifoj.



## La ekonomia raporto

Nia kasisto planis aperigi la jaran raporton post la UK. Bedaŭrinde ne estas eble ricevi ĝisdatan kontoeltiron de UEA. Tial nia estraro decidis, adapti nian financan jaron al tiu de UEA kaj aperigi la raporton future ĉiam post fino de la kalendara jaro.

*red. laŭ informo de la kasisto*

## La renkontiĝo de LSG kun la itala geja organizaĵo IREOS

Dank' al niaj italaj membroj Maŭro kaj Marco okazis dum la Florenca UK renkontiĝo de LSG kun reprezentantoj de la itala geja organizaĵo IREOS. La kunveno okazis vespere de la 31-an de julio en la ejoj de IREOS. Pli ol kvardek partoprenantoj. Oni informis reciproke pri la aktivecoj, vigle diskutis kaj amuziĝis. La kostojn de la bongusta bufedo ambaŭ organizaĵoj komune pagis.

*Rolf*

# Raportoj de UK en Florenco

## La jarkunveno de LSG

Lundon, post kvaronhora prokrasto, 36 kongresanoj sukcesis viziti la jarkunvenon de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG) en la salono Marignoni. Oni aŭdis raportojn pri agado en la franca gazetaro kaj televidservo kaj pri prelego dum la usona jarkunveno. Oni reelektis la malnovan estraron por dujara servodaŭro ĝis okazos jarkunveno dum la postsekva UK. Oni decidis aliĝi al internacia organizo ILGA post esploro per la estraro. Anonciĝis ekskurso al Lucca, Pisa kaj Torre del Lago.

*Toĉjo kaj Arnoldo*

*el Florenca Lilio n-ro 5, la kongresa kuriero*

## La tuttaga ekskurso

Merkredon, la 2an de aŭgusto 2006, 16 LSG-anoj el 9 landoj (Brazilo, Britio, Danio, Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Norvegio kaj Usono) unuafoje dum la oficiala ekskursa tago de la UK kune ekskursis per buseto. Nin ĉiĉeronis neesperantista italo, kies komentoj estis tradukitaj de itala ligano. Nia ekskurso kondukis nin al Lukko (Lucca), kie ni tagmanĝis en memserva restoracio, al Pizo (Pisa) kaj ties fama oblikva turo, poste al Lagoturo (Torre del Lago), ĉemara vilaĝo kie vivis la fama komponisto Puccini. La vilaĝo estas preferata de gegejoj dum la somero. La ekskurso finiĝis per naĝado en la maro, aperitivo en geja trinkejo kaj vespermanĝo en surplaĝa restoracio.

*Francis*



Pizo – foto de Helen

## Gejtema prelego en la Brazila Esperantokongreso

Kadu el Brazilo gvidis diskutrondon pri la temo ”Homaj Rajtoj kaj Seksa Diverseco – La samseksema movado en Brazilo kaj en la mondo, ĝiaj luktoj kaj konkeroj. Kiel kontribui al socio pli justa kaj solidara per la seks-amesprima diverseco?” en la Brazila Kongreso de Esperanto 15–19 julio en Campinas (www.esperanto.cc/bke/).

Kadu raportas jene:

Por buntigi la prezentadon mi uzis du kurtfilmojn: Implicacion – hispana filmo, 4-minuta kaj Sugar Baby Love – usona(?) filmo, ĉirkaŭ 3-minuta. (Oni povas spekti ambaŭ en www.youtube.com, sufiĉas nur tajpi iliajn nomojn en Search for – atentu: animaĵoj pornografiaj.*) Bedaŭrinde ne estis sono kiam mi montris ilin dum la programero... Sed ni babilis pri antaŭjuĝoj kaj iomete pri la filmetoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 homoj entute. Kiel ”invitita” estis amikino mia, Mary. Ŝi ne komprenas Esperanton, sed ŝi ŝatis la tuton kaj diris ke kelkajn aferojn ŝi komprenis. Dum la prezentado mi parolis iom pri agoj de la movado, kiel kisumado, kaj por montri iom mi prezentis fotojn de kisumado en kiu mi partoprenis en Campinas, la urbo de la kongreso. Ĝin organizis mia grupo Identidade – Grupo de Ação pela Cidadania de Lésbicas, Gays, Travestis, Transexuais e Bissexuais de Campinas.

En la fino de la programero pluraj spektintoj fotis nin kune kun nia bunta flago. Venontjare, en Rio mi deziras montri pli da filmetoj, subtitolitaj en E-o.



La paĝo de la grupo estas:
http://identidade.campinas.sites.uol.com.br/
http://identidade.campinas.sites.uol.com.br/ ➘
html/acontecendo/index_acontecendo.htm
– tie ĉi vi povas klaki en la tago 08.04.06 kaj vidi la fotojn de la kisumado.



La flago

*) Ĉe la menciita retejo oni ankaŭ povas vidi aliajn filmojn. Ekzemple reklamfilmon kun geja temo en Esperanto. Vidu ĝin ĉe interretadreso:
www.youtube.com/watch?v=sC2uAdWCQQk
Jose en lsg-ano trovis la ligilon.

*n. d. red.*

## Esti gejo en Barato/Hinda Unio

En 21 julio 2006 la brita televid- kaj radioentrepreno BBC publikigis artikolon en sia retejo pri la vivo de gejoj en Barato/Hinda Unio. Temas pri la grupo ”Sangini”, subten- kaj helpgrupo al gejoj, kiu kunvenas kvazaŭ sekrete ĉiusemajne en ĉefurbo Delhio. Oni konsilas al la anoj ne publike diskonigi la ekziston de la grupo kaj ĝiaj kunvenoj, ĉar samseksamo (”kontraŭnatura ofendo”) estas neleĝa en tiu lando. Fakte la sama leĝo enkondukita far la brita reĝimo antaŭ 145 jaroj ankoraŭ senŝanĝe validas. Ofte okazas policaj ĝenadoj kaj taŭzadoj, tiel ke necesas kaŝi sin kaj sian vivstilon. El tiu premo rezultas multaj personoj angoroj kaj persekutado ĝis eĉ en kelkaj ŝtatoj de la Unio sinmortigo. Eĉ kontraŭ-AIDOSO-kampanjantoj spertas foje polican ĝenadon, kaj unu el tiuj citis okazon, kiam polico arestis du virojn en parko pro nura mantenado. Eĉ grupo ”Human Rights Watch”, bazita en Usono, jam protestis al la Unia ŝtatestro pro tiu antikva leĝo el la kolonia periodo, kaj pluraj aliaj grupoj kampanjas ĉe kaj registaro kaj ĉe kortumo por reformo de tiu leĝo.

Ironio en la tuta afero estas, ke la lando havas longan tradicion pri tiaj samseksaj rilatoj, kion montras literaturo, artoj kaj jam miljaraĝaj tekstoj – la moderna lando tamen rifuzas legitimi ĉi ĉion.

Fonto: http://news.bbc.co.uk/2/hi/ ➘
south_asia/4850990.stm

*Brian (el lsg-ano)*
*Vancouver: http://esperanto.memlink.ca*

## Daŭras eksigoj el usona armeo pro gejeco

La novaĵservo de Pitsburga televidstacio WPXI raportis en 27 julio 2006 pri plia usona soldato eksigita el la armeo pro gejeco, spite de la politiko ”ne demandu, ne diru”, oficiale valida jam de 1993. Laŭ tiu politiko estas malpermesite al la armeo demandi detalojn pri onia privata seksa vivo, sed aliflanke sinkonfesintoj estas aŭtomate eksigitaj, tiel malfermante la vojon ankaŭ al venĝemaj kaj anonimaj denuncoj.

Ĉi-foje temas pri 30-jaraĝa, medalgajnin-

ta serĝento, specialisto pri la araba lingvo, kiu neniam indikis sian gejecon al superuloj, sed kiun plurfoje denuncis anonimulo per retpoŝtaj mesaĝoj al ĝuste tiuj superuloj. La afer-esploro daŭris 8 monatojn, sekve de kiu venis la eksigo ”kun honoro”, kune kun la tiurilataj oficialaj dokumentoj pri la persona soldata kariero, sed bedaŭrinde inkludanta ankaŭ la eksigo-kialon. Tiun lastan eron la soldato planas submeti al apelacia kortumo por eventuala forviŝo. Dum la unua esplorado la soldato rifuzis respondi al 19 el 47 demandoj pro timo de sinkulpigo, kaj kiam li fine petis ĉeeston de advokato, oni tuj ĉesigis la esplordemandadon. Li finfine akceptis la eksigon por ne riski plian akuzon pri ĵurrompo pro mensogaj respondoj.

Depost la ekvalidiĝo de tiu politiko oni eksigis jam pli ol 11 000 personojn, lastjare eĉ 726, kiu cifero estas 11% pli alta ol en 2004. Tiu totalo tamen reprezentas malpli ol 0,5% de ĉiuj 2 milionoj ĉial eksigitaj soldatoj, marsoldatoj, kaj maristoj. Oni notis tamen, ke preskaŭ 800 el la eksigitaj gejoj kaj lesboj posedas lertojn nemalhaveblajn en krizokazoj; inter tiuj estis 300 parolantoj de gravaj lingvoj (el kiuj 55 kompetentaj pri la araba, inklude de nia sarĝento). La kosto al la Pentagono de tiuj eksigoj kaj anstataŭigoj atingas preskaŭ 369 milionojn USD.

La artikolo finas citante plian kazon pri 42-jaraĝa lesba flegistino, majoro kaj 19-jara veteranino de la flugarmeo, ankaŭ gajninto de pluraj medaloj kaj same anonime denuncita, kiu apelaciis kontraŭ sia eksigo. Juĝisto en la ŝtato Vaŝingtonio tamen rifuzis permesi ŝian apelacion kontraŭ la eksigo el la armeo, sub la preteksto, ke ŝi nun jam publike agnoskis sian lesbecon. La fina decido ankoraŭ ne venis.

Fonto: http://www.wpxi.com/ ➘
news/9583220/detail.html

*Brian (el lsg-ano)*
*Vancouver: http://esperanto.memlink.ca*



## Multo okazis en Kanado

En Montrealo okazis je la fino de julio plurajn mondskalajn gejajn eventojn, nome la Internacia Konferenco pri GLAT*aj Rajtoj kaj la unuaj mondaj Outgames (”malkaŝemulludoj” – menciitaj en la antaŭa numero de Forumo), gegejaj olimpikoj, samtempe kiel la Divers-Cité gej-fiera festsemajno. La franclingva geja revuo ”RG” esprimis la bonvenigon de gegejoj el tutmondo per eldono de komencartikolo en la franca, angla, hispana... kaj Esperanto. La artikolo troviĝas en ”RG”, numero 287, aŭgusto 2006, paĝo 5.
La Internacia Konferenco pri GLATaj Rajtoj finiĝis kun la eldono de la Deklaracio de Montrealo pri GLATaj Rajtoj, unu el la unuaj kaj plej ampleksaj deklaroj de

GLATaj rajtoj jam. Eblas legi mian Esperantan tradukon de la deklaracio ĉe Vikifonto: http://wikisource.org/wiki/ ➘
Deklaracio_de_Montrealo

*) Gej-Lesb-Ambaŭseksem-Transgenr-

*Mateo (el lsg-ano)*

## Pli pri la Festivalo de Fiero en Jerusalemo

En 6–12 aŭgusto ĉi-somere renkontiĝis GLATuloj el la tuta mondo en Jerusalemo por World Pride 2006, la Internacia festivalo de geja fiereco. Rimarkinde estas, ke ĉi tie pace kaj ame renkontiĝis GLATaj judoj, muslimoj kaj kristanoj. La temo de la festivalo estis ”Amo sen limoj”. Samtempe apenaŭ 150 km norde okazis la milito inter Israelo kaj Libano. Iu en banderolo travestiis la temon per: ”Limoj sen amo”.

Kiel menciite en artikolo de la antaŭa numero de Forumo, okazis multaj protestoj, precipe far religiuloj, kontraŭ la okazigo de la festivalo. Por-palestinaj grupoj ankaŭ vokis al bojkoto de la festivalo, protestante kontraŭ la israela bombado en suda Libano. Anonima flugfolio estis disdonita kun promeso de premio al tiu, kiu mortigas unu el la partoprenantoj de la festivalo. Multaj partoprenontoj malmendis siajn vojaĝbiletojn, sed la festivalo tamen okazis. La polico malpermesis la grandan marŝadon en la stratoj pro la malstabila situacio de la lando, sed permesis kelkajn malgrandajn manifestaciojn pri homaj rajtoj. Tial oni tamen povis vidi en la stratoj i.a. virojn kun judaj ĉapetoj en la koloroj de la ĉielarko kaj en parko flirtis la israela kaj libana flagoj unu apud la alia. Kadre de la festivalo okazis interreligia konferenco kun la temo ”Repostuli nian kredon kaj heredaĵon”. Malgraŭ la minacoj, neniu perforto okazis dum la festivalo.

*El gazeto ”Kyrkans tidning” nr-o 34*



**PRI VI...**



Pri vi pensante
mi kreas vortojn
vi alvenas
vi de ĝuo estas ombro
ensemita en ora lumo de la nokto
do, apogante min je via dolĉa ri-
deto
mi ripozas
en la ombro de via amo
per la rideto
mi vokas viajn manojn
ensorĉigas mi ilin
per varmo de la haŭto
kvazaŭ sunradioj amplenaj
vi alvenas por lumigi la tagon de
sopiro



**LASU...**

Lasu min, rememori la tagon
kaj ĉiun matenon, kiam vi braku-
madis min
La vojon malfacile trovi
Sen viaj dolĉaj kisoj
Mi ne scias kie
Mia hejmo dormas
Kie ĝi estas
kun via varm'
Lasu min, rememori la tagon
do, brakumu min, kaj nenio plu
resti ĉi tie
enluligante sonĝojn viajn....

*Princo*